

bulgara esperantisto

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la M-rio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

JARO XXI

SOFIA

15 NOVEMBRO, 1940



L. R. M. BORIS III
reĝo de la bulgaroj

NIA REĜO

Lia Reĝa Moŝto Boris III, reĝo de la bulgaroj, estas naskita en 1894 en la bulgara ĉefurbo Sofio.

Dotita je granda kaj multrilata inteligenteco kaj eruditeco, Li ĉarmas ĉiun fremdulon, kiu havas la feliĉan okazon interparoli persone kun Li.

Tre demokratia, proksima al la popolaj penoj, sopiroj kaj idealoj, Li estas amata senrezerve de la tuta bulgara popolo. Li simbolas la unuecon de ĉiuj bulgaroj kaj ilian firman volon vivi libere.

Dum lia juneco Bulgarujo streĉis superhome siajn fortojn, por solvi siajn historiajn problemojn kaj atingi siajn naciajn idealojn. Tiam la bulgara popolo travivis tagojn de gloro kaj venkoj, sed ankaŭ donis grandajn oferojn. En tiu malfacila tempo Li, kiel princo-heredanto, estis inter la militistoj sur la batalkampo kaj ekkonis senpere la turmentojn de la milito.

Tre juna Li devis surpaŝi la tronon de la bulgaraj reĝoj kaj ekgvidi la ŝanceligi-

tan kaj senordan ŝtaton tra dornoplana vojo, inter malamikoj de ĉiuj flankoj, al restabiliĝo kaj al kultura progreso. Malfacila tasko! Sed Li sukcesis en daŭro de 20 jaroj restarigi la ŝtaton, altigi la kredon kaj la spiriton de la bulgara popolo post la grandaj malsukcesoj.

Per saĝa politiko de pacemo, sed digna rezisteco, Li jam atingis la grandan sukceson: revenigi al la patrino Bulgarujo la amatan parton de nia patrolando — la ora Suda Dobruĝa, kiu dum pli ol 20 jaroj suferis sub jugo. Kaj tiu ĉi granda akiro okazis laŭ paca vojo, sen sangoverŝo.

La bugara popolo, kiu stoike atendis la tagon de la justeco kaj fidele sekvis sian amatan Reĝon ĝis nun, kun pli forta kredo amasiĝas ĉirkaŭ Lia trono, en espero vidi baldaŭ likviditaj laŭ la sama paca maniero ankaŭ la ceterajn maljustojn, kreitaj per la diktato en Neuilly antaŭ 21 jaroj.

DOBRUĜA ESTAS JAM DENOVE EN BULGARUJO

La 7-an de septembro j. k. inter Bulgarujo kaj Rumanujo en la Rumana urbo Krajova estis subskribita packontrakto, laŭ kiu Rumanujo redonas al Bulgarujo la sudan parton de Dobruĝa.

La Suda Dobruĝa estas altebenaĵa teritorio de 7525 kv. kilometroj da surfaco, en kiu troviĝas la urboj: Silistra, Dobriĉ, Tutrakan, Balĉik, Kavarna k. a. La tuta loĝantaro nombras ĉirkaŭ 400,000 da homoj.

Ĝi estas bulgara teritorio, kiun Rumanujo, profitinte la malfortecon de Bulgarujo post la interbalkanlanda milito dum 1913 jaro, uzurpis — forprenis de Bulgarujo. Dum 1918 j., en la tempo de la granda milito, Dobruĝa estas denove bulgara, tamen ne por longa tempo, ĉar post la milito, laŭ la diktato de Neuilly, oni ĝin denove deŝiris de Bulgarujo kaj redonis al Rumanujo, por granda ĉagreno de ĉiuj bulgaroj.

Tamen, ĉiam tra la jarcentoj, Dobruĝa estis kaj estas bulgara. En 679 jaro la bulgaroj venkis la bizancanojn kaj igis ilin rekoni la nove fonditan Bulgaran Ŝtaton en Dobruĝa. Do en Dobruĝa naskiĝis la bulgara ŝtato kaj de tiam ĝi ne ĉesis resti la lulilo de la bulgarismo. Dum 1870 jaro laŭ la sultana fermano en la bulgara ekzarkia regiono estis enkluzita la tuta Dobruĝa kaj la delto de Danubo. Per tiu akto estas rekonita la bulgara karaktero de Dobruĝa. Dum 1878 j., post la Liberiga milito, Dobruĝa estis parto de la nove liberigita Bulgarujo de la turka jugo, tamen la tiama eŭropa diplomataro dividis Dobruĝan en du partoj kaj donis la nordan al Rumanujo, (malgraŭ la malaprobaj kaj protestoj de la rumanaj aŭtoritatuloj kaj parlamento), kaj la sudan — al Bulgarujo.

Dum 1918 j. en Dobruĝa loĝis ĉirkaŭ 300,000 da loĝantoj, 250,000 el kiuj estis

bulgaroj. Ĝis la rumana invado en Dobruĝa ekzistis ĉirkaŭ 250 elementaj lernejoj, 15 progimnazioj kaj gimnazioj, pli ol 80 preĝejoj kaj tiom da leĝejoj bulgaraj. Post la rumana okupado ĉiuj ĉi institucioj estis aŭ neniigitaj, aŭ rumanigitaj. La denaciiga politiko de Rumanujo ne sukcesis tamen neniigi la bulgaran popolon en Dobruĝa, ĉar forta estas la bulgara konscio en tiu popolo!

Krom tio, Dobruĝa estis la grenujo de Bulgarlando, ĉar tie troviĝas la plej taŭgaj kaj fruktodonaj grenkampoj.

Nun la tuta bulgara popolo festas, festenas kaj ebriiĝas pro ĝoio, ĉar Dobruĝa estas denove libera — ke ĝi estas denove en la ĉirkaŭbrakoj de la partino Bulgarujo.

Nun, ĝi denove povas ĝui la liberecon, la sunon de sia familio, renaskita, forti-

gita kaj kreanta kulturon. La nigraj datoj de la jugo estas jam for. Septembro 1940 estas nova dato en la historio de la du popoloj: bulgara kaj rumana, ĉar ĝi solvis bonvole, sen sangoverŝado unu grandan demandon, kiu malheligis la interrilatojn inter la du popoloj.

La liberigo de Dobruĝa ĝojigas ĉiun bulgaran koron. Ĝi estas granda glora solenaĵo de la bulgara spirito kaj unueco. Ĝi estas granda festo ankaŭ por la bonaj internajbaraj rilatoj de Bulgarujo kaj Rumanujo. Bulgarujo penos forgesi la malbonan pasinton. Ĝi forgesos la iamajn ofendojn kaj suferojn. La du popoloj ekvivis denove en interkompreniĝo.

„Bulgara esperantisto“ sincere partoprenas en la tutpopola ĝojo.

St. Ganĉev

LA GRANDA POPOLA ĜOJO

1913. Malĝoja jaro por la tuta bulgara popolo. Post grandaj bataloj, post triumfaj marŝoj, kiam la bulgara armeo almilitis la citadelon Odrin, atingis Konstantinoplon, ni malfeliĉe estis ĉirkaŭitaj je ĉiuj flankoj de malamikoj. Niaj estintaj kunuloj kaj kunbatalantoj serboj, grekoj kaj montenegranoj ekvolis forrabi la fruktojn de nia granda venko. Ili estiĝis niaj malamikoj. Turkoj denove revenis kaj prenis denove Odrin kaj Lozengrad. Bulgarujo, bela nia patrujo, estis en granda embarraso. Tiam perfide la rumanoj atakis nian ĉefurbon Sofia. Nenie ili renkontis bulgaran soldaton. Ili ekskursis. La bulgaraj soldatoj batalis sukcese kun grekoj kaj serboj. La tuta greka armeo estis ĉirkaŭita de bulgaraj soldatoj kaj ĉiumomente povis esti kaptita. Granda malhonoro atendis la grekojn. Pro tio ili petegis la rumanojn ke ili rapidu alproksimiĝi kaj eniri en la ĉefurbon Sofia kaj tiamaniere la bulgaroj, malgraŭ ke ne estas venkitaj, estu devigataj akcepti la proponitan pacon. Ĉirkaŭita je ĉiuj flankoj demalamikoj: rumanoj, grekoj, serboj, turkoj, Bulgarujo devis cedi. La bulgaraj delegitoj iris en Bukureŝton kaj dum julio 1913 subskribis

malhonoran pacan pakton. Rumanujo forrabis la riĉan kaj fruktodonan ebenaĵon Dobruĝa, kun la belaj bulgaraj urboj Dobriĉ, Balĉik, Silistra, Tutrakan, Kavarna kaj multaj belaj bulgaraj vilaĝoj. La filoj de tiu lando batalis kun siaj fratoj de tuta Bulgarujo kaj glorigis la nomon de la bulgara soldato. Tiuj niaj malfeliĉaj fratoj estis sklavigitaj. Bulgaraj preĝejoj kaj lernejoj estis fermitaj, la pastroj kaj instruistoj forpelitaj. Multaj niaj fratoj devis forkuri kaj veni en la liberan bulgaran ŝtaton. Ankaŭ tiam la turkoj denove prenis Orientan Trakujon kun Odrin kaj Lozengrad. La serboj kaj grekoj dividis Macedonion. Ni donis plej multnobrajn viktimojn dum milito kaj prenis malriĉajn regionojn en monto Rodopi, sed perdis oran Dobruĝa-n. Laŭ la pakto en Bukureŝto ni posedis malgrandan bordon de Blanka (Egea) maro kun havenoj Dede-Agaĉ kaj Porto-Lagos.

Post tri jaroj dum la Monda milito ni venkis la rumanojn. Tiam ni batalis kune kun le germanaj soldatoj. Dum du jaroj Dobruĝa estis libera kaj ĝoja. Sed laŭ la pakto en Neuilly dum 1919, 27-a de novembro la venkintoj denove forrabis nin.

Ili denove donis Dobruĝa-n al la rumanoj. Denove nigra malĝojo falis sur la frukto-donajn kampojn de Dobruĝa. Denove nigra sklaveco kaj persekutoj teruraj atendis niajn fratojn mulfeliĉajn. 27 jarojn daŭris tiu nigra kaj netolerebla sklaveco.

Sed viva estis la bulgara Dio. La 7-an de septembro 1940 j. en Krajova, Rumanujo kaj Bulgarujo subskribis kontrakton, laŭ kiu Dobruĝa denove estis redonita al la Patrino-lando. Granda estis kaj estas la popola ĝojo. Denove ĉiuj bulgaroj en Dobruĝa libere parolos en sia belsona kaj amata bulgara lingvo, malfermos siajn preĝejojn kaj lernejojn. Ĉiuj bulgaroj dankas al la grandaj ŝtatoj, kiuj faris tiun noblan

agon — liberigon de bulgaroj en Dobruĝa, tiu Dobruĝa, kiun tiel majstre kaj verame prikantis nia neforgesebla Jordan Jovkov. Pro tio naj fratoj en Dobruĝa tiel ĝoje renkontas en urboj kaj vilaĝoj la pacajn liberigintojn — soldatojn. Suno ekbrilis denove sur la ebena kaj ora Dobruĝa.

Ni esperu, ke sub la saĝa gvido de Lia Reĝa Moŝto caro Boris III kaj de la registaro kun s-ro ministro-prezidanto nia eminenta scienculo prof. Bogdan Filov, Bulgarujo, nia bela lando, atingos novajn sukcesojn kaj liberigon de ĉiuj regionoj, loĝigitaj je bulgaroj.

S.

MORALA FORTO

Grandega estas la ĝojo de la bulgara popolo. Senmezura estas ĝia entuziasmo pro la reakiro de la „orgrena Dobruĝa“! Ĉar tre maldolĉa estis la maljustaĵo, kiun faris najbaraj kaj malproksimaj popoloj al ni antaŭ pli ol 20 jaroj, forŝirante pecon de karno el la vivanta organismo de Bulgarujo. Kaj — tre, tre longe daŭris la doloro!

Sed en la nunaj tagoj de feliĉa ĝojo la bulgara popolo ne montras malaman senton al tiuj, kiuj kaŭzis ĝian grandan ĝisnunan doloron. Ĝi ne esprimis malicon al tiuj, kiuj ĝis hieraŭ subpremis juĝe iliajn fratojn en Dobruĝa.

Kontraŭe, nun ĝi grandanime etendas sian manon al la norda najbaro — la rumana popolo, por plua frata vivo en paco kaj interkompreno.

Tiuj ĉi sentoj estas klare esprimitaj en la Reĝa manifesto pri la re-aligo de Dobruĝa al la Patrino-lando:

„Dobruĝa estas denove nia. Ĝia reveno al la patrujo fariĝis laŭ paca maniero, kiu ne povas postlasi semojn de malamikeco kaj soifon por revenĝo, sed larĝe malfermas vojojn por restarigi la tradicion amikecon inter la du najbaraj popoloj“.

En simila senco aperis multaj artikoloj en la bulgara ĵurnalaro.

Samajn pensojn esprimis ankaŭ la bulgara Ministro-prezidanto s-ro prof. D-ro Bogdan Filov en sia granda parolado en la Parlamento.

La maniero, per kiu adiaŭis la rumanaĵ soldatoj siajn bulgarajn kamaradojn, forlasante la ĝisnunan limon, la frataj ĉirkaŭprenoj de la soldatoj de la du armeoj en tiaj cirkonstancoj, parolas same pri la sincera deziro starigi rilatojn de paco kaj kunlaboro en la estonteco.

Vere, en la lastaj momentoj nia ĝojo estis malheligita pro individuaj ekscesoj de apartaj rumanaĵ subjektoj kontraŭ niaj samnacionoj en kelkaj vilaĝoj de Dobruĝa. En tiu granda momento tamen ni estas pretaj ankaŭ tion pardoni: ni ne ĵetos la akuzon al la tuta rumana popolo pro tiuj ĉi maldignaj elmontroj.

Ni pruvos, ke la bulgara popolo havas sinceran volon krei kondiĉojn por paca kunvivo kun la najbaraj popoloj — ne aspirante por fremda tero, necedante tamen la sian, kaj ĝi havas la moralan forton plenumi tion!

EBRIĜO

Mi ŝatas tra l'veluro ondiĝanta de l'prin-
tempo ekvagabondi —
laŭ fajreranta sub matenradioj ros' —
por ke surblovu min l'odoro freŝa kaj facila
je mil' da floroj, ter' kaj sennombra mi-
raklar' . . .

Kaj kontraŭ la vento,
siblanta en la herboj de l'kampar'
ekŝeti kapon en febro de senfina ebriiĝo
kaj kuri, kuri . . . ĝis kiam falos
kvazaŭ freŝa falĉita'o, jen feliĉa
jen spireganta pro l'kurado,
sur la kamparon sola en silent' . . .

Ĉu pekas mi trinkante plenmane la ĝojon
de l'radianta bellazuro . . .

kaj de la vrma
sufokiĝanta pro l'abunda vivo ter' ?
Ĉu pekas mi trinkante kaj ebrie

disverŝante ĝojon for en rond' ?
Ĉu pekis mi en mateno de l'juneco
trinkante de l'kaliko suna — kuniginta
la fajron kaj la lumon —
akcelon al spirit' doninta ?
Ho ne rekantu la centjaran kanton —
kantatan kanton de l'gentaro —
la kanton, vivan ĝojon mortigantan !
Ĉu ne libera spirit' kaj amo naskis nin,
kaj la amo ĉu
ne estas voko de l'anim' potenca kaj eterna ?
Alvenu, gefratar', soifa kaj malsata
detrui la digegon de l'ŝlosita dum cent-
jaroj ĝoj',
Ke torentar' ekŝprucu kaj surverŝu teron,
kaj la spirito soifanta ekmutiĝu en ebri' . . .

Ruja Gornjanska

LETERO

al Kanĉjo Tomev

Ankoraŭ en miaj oreloj sonoras viaj
lastaj vortoj. Ankoraŭ antaŭ mi — en
mia memoro — staras via figuro: brila kaj
kara al mi. — —

— Ĉu tio ne estis sonĝo ?

— Ĉu ne estis inkubo de turmenta son-
ĝo, — deliro de dolorema animo ?

Mi ne povas firme tion diri al vi. Kaj
tamen mi emas rememoradi (— dolĉe kaj
pasie —) pri nia lasta renkonto, post lon-
ga disiĝo kaj, eble, miskompreno.

*

Mi jam denove estas hejme.

(Delonge mi forlasis la urbon de mia
kamaradeco. Nun mi rifuĝis novan lan-
don). Post longa migrado: malsata kaj
forpelata de ĉie.

Min, tamen, logas kora kaj tenta re-
memoro:

— Vi —

Sed . . . vi estas for de mi.

La vivo: kruela kaj senkompata disi-
gis nin. Ni ne plu povas dividi niajn sen-
tojn, revojn — niajn ĝojon kaj triston.
Kaj malgraŭ tio, super la senfundaj abi-
smoj de la obskura vivo, ŝvebas niaj ani-

moj. Nenio estas en stato disigi ilin —
forigi ilin unu de alia. Ili estas nedisigebaj.
Ili vivas unu ĉe alia. Super la mondo.
Trans spaco kaj tempo.

Por ĉiam.

Eterne.

*

Rememoru!

*

Somero. Ĉielo — blua, ŝenfina kaj
malproksima. Sur ĝi — la suno. Granda
orfajra disko. Gracie ĝi naĝas sur la trank-
vila oceano de lazuro. Kresĉende. Har-
monie. Jen: —

Milo da multkoloraj radioj dancas.
Sin kisas kaj amas. Ili petole karesas la
teron. Maltrankvile forkuras. Perdiĝas en
la etero.

Delikata vento lulas la arbojn.

Ni estas ambaŭ. Vi ĝojas. Mi estas
apud vi. Ĉe vi: — en la altkreska herbo.
Sub la pompaj betuloj.

Preter ni fluas Rosica. Ĝiaj akveroj
saltas de ŝtono al ŝtoneto. La rivero flus-
tras al ni enigmajn fabelojn.

Ni ridas. Petolas. Mi kaj vi. La tuta mondo.

Ĉielo, tero.

*

Vespero. Finbrulas la krepesko, kaj inside — la mallumo ĉirkaŭprenas la teron. Ĝi ŝetas sur la lacajn kamparojn sian nigran mantelon. Volupto plene premas la sangajn lipojn de l'papavoj . . . kaj pasie ekkisas ĉiun floron.

La nokto trene alteriĝas. Iĝas nokto.

La luno — maljuna serpento — ŝtele surĉieliĝas (kun ŝtona rideto surlipel!). Ĝi fikse rigardas. Observas.

La steloj timeme detiriĝas. Forflugas.

(La luno — maljuna serpento — nerve serpentumas sur la firmamento).

Trankvilo. Kaj ni marsas. Sur la mallarĝa vojeto en la arbaro. Mi kaj vi, ambaŭ ni. La arbaro kviete malfermas siajn logajn angulojn. Riĉe ornamitajn. Bonodorantajn.

Vivĝoje batas mia koro. Dum — mia animo kantas himnojn pri vi. Pri via juneco. Pri animo: vasta kaj enigma.

Kaj la arbaro akompanas. Per siaj torrentoj. Per siaj herboj. La vento susuras Ne! — ĝi kantas: kiel mi: animo — samkiel vi.

*

Rigardu: — ĉielo serena. Spaco radioza. Bonodoranta aero, kaj vento kiu milde karesas. Verde brilaj herbejoj. Konataj vojetoj. Densarbaro. Torrentoj, kiuj kantas. Grenkampoj: oraj kaj ondantaj. Milo da birdoj pepas. Altaj montoĉenoj. Neĝokovritaj pintoj. Ili kisas la frunton de la universo.

Tio estas: — mia vasta kaj laca patrolando.

Sed — vi estas malĝoja. Via frunto — sulkita. Via brusto sopiras ion: novan kaj nekonatan. Kaj vi jam silentas. Ne emas paroli.

Vi enuas.

Nenio plu allogas vin ĉe ni. En la trankvila urbo apud la monto. Eĉ: —

La aŭtuno. (Tiam estis septembro).

Ebria. Petola. Flirtema. Dancanta kun sia nudigita ĉagreno. Surla multkoloraj makuloj de la kamparo. Sub sonoj de de l'kanaj flutoj. La flutoj de l'vento.

— Ĉarmantino!

Senhonte dekoltita. Odoranta je pezaj parfumoj. Kun pasie spiranta sino kaj bole sanganta koro.

— Aŭtuno!

La nokto estas amo. La mallumo — veluro.

Tamen ĝi ne plaĉis al vi. Mi scias pro kio.

Ĉar: —

Vi jam sopiris la grandurbon: kolosan kaj bruoplenan. Kun ties feraj vejnoj kaj elektraj okuloj. Vi sopiris la adultajn vesperojn de la centmila urbo. Ties multkolorajn amasojn ŝprucantajn tra la larĝaj bulvaroj. — Kaj fine vi forlasis nin. Por enloĝi la urbon de viaj sonĝoj kaj revoj.

Vi foriris.

*

Jen: — malsupre en la ebenaĵo la nokto malfermas kurtenojn. Kaj ekbrilas mil girlandoj el purpur' mil elektraj sang-okuloj super urb' — ebria plentrua. . .

Tiam vi ekiris sur la stratoj de l'grandurbo. La amaso sin puŝis al vi. Kaj tiu ondo el homoj vin portis ien. (Vi mem ne sciis: kien?) Ĉio: la petola multo el koloroj. La logaj dekoltaĵoj virinaj. La ebriaj frapoj de ĝejs-orkestro. La lumo de l'sennombraj elmontraj fenestroj. Krioj. Flustroj. Volupto kaj krimo —

estis fremda al vi.

Malgraŭ tio vi marŝis pluen. Ĉar vi deziris gustumi la aromon de tiu pompa kaoso el lumo kaj mensogo. Tiel vi daŭrigis marŝi. Inter la amaso de l'nokta festifalo. Kaj la viola nokto volupte vin premis al sia koro. Ĝi ĉirkaŭprenis vin — kaj pasie komencis vin kisi, kisadi. . .

*

Tio estis iam. Kaj kio estas hodiaŭ?

Stefan Masserov

STEFAN AT. BOBEV
lernanto-Burgas

TRA LA BELA BULGARUJO

AL LA KAVERNOJ

(Priskribo)

Frua mateno estas. Ruĝiĝas purpura oriento, montrante baldaŭan ekbrilon de l'ora Febo. Blanka nebulo volviĝas en la valo kaj malrapide sin levas al la altaj supraĵoj. La aero estas freŝa, malvarma, agrabla. En ĝi sentblasodoro de roso kaj aromato de pina rezino.

Ni, mi kaj mia kamarado, jam komencas la supreniron. Nia celo estas klara — la kavernoj super *Lakatnik*.*) La vojeto



La ponto super rivero Iskâr — Lakatnik

serpentumas sur la kruta bordo de rivero Iskar. Ien mallarĝa, kvazaŭ araneaĵo, ponto pendas super la rivero. Ĉe niaj paŝoj ĝi fleksas sin kaj luliĝas. Sed ne timu, ĝi estas sufiĉe solida. Ĉiutage ĝin trapasas peze ŝarĝitaj montanoj. La mallarĝa vojeto estas kruta kaj ni pene supreniras. Ni marŝas atente, ĉar ĉiu malĝusta paŝo lasus nin en la malvarmaj ondoj de Iskar. Pli kaj pli vastiĝas la horizonto antaŭ niaj okuloj: supraĵoj, valoj, kaj ŝtonegoj. Sed jen, ni estas jam sur la supro. Eta ripozo! He, rigardu la sunon! Vidu, kiel ĝi banante en fajro kaj flamo, leviĝas! Kiel mirinde ori-

*) Montara vilaĝo en la mezo de la bela intermonto de r. Iskâr, unu el la plej pentrandaj lokoj de nia bela patrujo.

gas per siaj radioj la suprojn! Ho, nur tiu vidaĵo, la vidaĵo de l'ekbrilanta suno indas la penan supreniron. Jen la vera naturo, jen la vera vivo! For estas ĉio falsa, malnatura.

Nin atingas alia kompanio de turistoj kaj ĉar ni iras unuan fojon al al kavernoj, pli bone estus, ke ni iru kun ili. Kaj pli gaje estos. Niaj novaj konatoj estas gejunuloj, viglaj kaj gajaj. Ili nin akceptas kore kaj kantante ni ekiras. La vojeto pasas preter abismo ege profunda. Ho ne kuraĝu rigardi malsupren! Vi senkonsciiĝos Jen, la danĝera loko estas pasita, ni marŝas antaŭen.

Sed jen jam la kaverno mem. Lastaj preparoj, ni eklumigas la lampojn kaj . . . ĝis revido, suno! Ni droniĝas en la malluman kaj malvarman, kvazaŭ tombo, faŭkon de la kaverno. Ni marŝas grupe, la lampoj briletas apenaŭ lumante en nia vojo. Estas kavoj kaj ŝtonoj. La muroj estas mucidaj: senbrue, ne aŭdeble larmas akvo.

— Rigardu stalaktitojn kaj stalagmitojn! montras iu el la grupo kaj levas la lampon. Ĉe ĝia pala lumo sin pentras pezaj pendaĵoj kaj kolonoj, kaj desur ili gutas malvarma akvo. La tunelo estas vastiĝinta kaj nun ni estas en halo vasta kaj alta. Ni portas kun ni paperrubandojn, ilin amasigas kaj ekbruligas. La flamaj langoj lumigas la halon. La vidaĵo estas momenta, sed neforgesebla: desur la volbo pendas, kvazaŭ punktoj, sennombraj pendaĵoj kaj sur la planko stalagmitoj kaj diversaj formoj similas je skulptaĵoj. Kia neatingebla kreisto estas la naturo! Per kia arto estas farinta ĝi ĉion!

La papero forbrulas, la mallumo nin ĉirkaŭprenas. La vidito longtempe restas en mia imago. Sed tio, mi pensas, estas nur unu paĝo el la bela libro de la na-

turo. Ni ekiras, sub la pala lumo de la lampoj. La sonoj de niaj vortoj eĥas internen en la mallumo.

— Haltu, profundaĵo! — la unuaj hezite haltas, la lampoj kliniĝas por esplorado. Ĝi ne estas granda. Sed la tunelo finas. Ni devas jam reveni. O, kiom agrabla estas la taga lumo, kiel mildaj estas la sunradioj.

Ni ripozas, manĝetas kaj nin pretigas por enirado en la suban, pli grandan kavernon. La vojeto nin alkondukas antaŭ ĝia enirejo, kaj ni unu post alia eniras en ĝin. Ĉe niaj unuaj paŝoj, maltrankviligita de la lumo de niaj lampoj, elfugas vesperto, ĉirkaŭas kelkfoje super ni kaj malaperas en la mallumon. For, antaŭe aŭdeblas surda tondrado, kiu iom post iom plifortiĝas.

— Ĉu vi aŭdas? Tio estas la rivero?

— flustras iu iranta apud mi.

— Ĉu estas rivero en la kaverno? — demandas mi naive, ĉar verdire, mi eĥe ne supozis tion.

— Estas ne nur rivero, sed ankaŭ akvofalo kaj lago! — respondas ridante li.

La muĝado jam tre klare aŭdeblas, ni alproksimiĝas al la rivero. La tunelo faras akran kurbiĝon kaj . . . jen ni estas antaŭ ĝi. Sub niaj kruroj estas lageto, ŝaŭmanta, kvazaŭ la akvo bolas. La rivereto pli, ĝuste la torento, kiu ĝin faras, venas verŝajne desupre, bruegas, muĝas, ŝaŭmas kaj iom trankviliĝinte eniras en la buŝon de la kanalo. Ni krias, kriegas, sed la bruo surdigas niajn voĉojn. La tuta ĉirkaŭaĵo tremas kaj eĥigas. Kiom proksime super niaj kapoj estas la volbo de la kaverno! Kaj kiel la homo sin sentas en-

fermita, kaj ŝajnas ke — ĉi-tiu volbo pezas sur liaj ŝultroj. Kaj kio estas li ĉi-tie, antaŭ la naturo? Neniaĵo, ero, mikrobo. Plej malfacila ekstremo en la brusto de la tero frekasus nin aŭ nin enfermus poreterne. Sed ĉu gravas la eroj por la kosmoso?

Guto da malvarma akvo, falinta en mian dorson min vekas de miaj filozofaj pripensoj. En mia mano la lampo tremetas kaj ĝia flava lumo ŝajne palpebrumas por trankviligo. Ni ekiras supren laŭ la baseno de la rivero. Ĉi-tie sen lampo ne eblas fari eĥe paŝon. Vojeto malestas, anstataŭas ĝin la mallarĝa spaco inter la rivero kaj la muro. Ofte oni devas pasi jen al tiu, jen al alia flanko. Tiu pasado estas tre danĝera, ĉar ĉiumomente oni povas fari malvarman baniĝon.

Sed ni disiĝas kun la rivero ekirinte sur la elirvojon. Ankoraŭ unu lasta peno nin atendas — „Ĉatalat“. Tio estas ŝajne la plej malfacila por irado loko en la tuta kaverno. Ĝi estas mallarĝa absimo, super kiu oni devas pasi disetendante la kruojn, tenante sin per manoj je muroj. Kie estas mallarĝa — bone, sed ĝi plilarĝiĝas kaj sufiĉe da peno sentas la homo ĝis kiam li pasigas ĝin. Kaj se ne povus! . . . Sub li faŭkas kvinmetra mallumo. Sed ĉu la ĝuado de la naturaj belecoj estus tiom agrabla, si ili ne estus malfacile atingelblaj? Reciproke nin trenante, ni ĉiuj trapasas bonfarte. Kaj unu ĝemo, vera ĝemo de faciliĝo eksonas el niaj brustoj, kiam la kruroj jam estas sur fortika tero. Kaj jen, videblas la pala taglumo. Ni estas jam ekster la kaverno. Felice ridas la bela mondo kaj en la intermonto iu trajno sonigas la rokojn.

RAPORTO PRI NIA 27-A KONGRESO EN LOVEĈ

La 14-an de julio 1940 en Loveĉ okazis la 27-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj.

La solena malfermo de la kongreso okazis en la salono de la urba legejo „Nauka“ kun gratulparolado de la prezidanto de la Loveĉa esperantista societo „Espero“ s-ro Bliznakov. Li proponis kaj la kongreso elektis per aplaŭdoj la jenan kongresestraron: prezidanto—Ĥristo Pet-

rov el Varna, vicprezidanto — Radoslav Triĉkov el Vraca, sekretarioj — Ivan Dimitrov el Sofia, Kunĉo Vâlev el v. Dobromirka kaj Nikola Vasilev el Trojan.

La prezidanto da la kongreso s-ro Petrov faris paroladon pri la rolo kaj la signifo de Esperanto en la vivo.

Laŭ lia propono la kongreso elektis komisionojn por la rajtigiloj, por la buĝeto kaj por la rezolucioj.

La kongreson salutis la urbestro, la regionestro kaj la reprezentanto de la ĉefepiskopo.

La kongreson salutis ankaŭ reprezentantoj de multaj kulturklerigaj organizaĵoj. Estis ricevitaj ankaŭ multaj saluttelegramoj.

La kongreso sendis gratultelegramon al L. M. reĝo Boris III, al la Ministro prezidanto k. a.

Post la solena malfermo de la kongreso komenciĝis la laborkunsidoj (14 h. 30 m., 14. VII.).

La tagordo de la kongreso estis la jena:

Raportoj de la Centra komitato kaj de la Kontrola komisiono.

S-ro Ivan Dimitrov tralegis ankaŭ la raporton de la Kontrola komisiono.

En la debatoj partoprenis multaj samideanoj.

Por la estonta agado de la asocio oni rekomendis la jenajn iniciatojn: malfermon de esperanto-kursoj, pli bonan redaktadon de la „Bulgara esperantisto“, organizon de esperantistaj renkontiĝoj kaj konferencoj, kooperativan eldonon de esperanta literaturo ktp.

La kongreso voĉdonis kaj akceptis la buĝeton por la 1941 j.

Por la nova estraro de la Asocio oni elektis:



La 27-a esperanto-kongreso en Loveĉ.

2. Diskutado pri la raportoj.
3. Liberigo je respondeco de la gvidantaro.
4. Estonta agado.
5. Diversaĵoj.
6. Elekto de nova Centra komitato kaj Kontrola komisiono.

Raporton pri la agado de la Centra komitato faris s-ro Ivan Dimitrov. Dum la jaro plej agema estis la societo en Varna. En Bulgarujo estas 21 esperantistaj societoj kun 308 membroj.

1. por la Centra komitato: At. D. Atanasov — Ada, prof. St. Ĝugev, Belĉo Oktomvrijski, Bogdana Popova, Stefan Ganĉev, Ivan Sarafov kaj Ivan Kotov;

2. por la Kontrola komisiono: Georgi Hârŝev, Stefan Jonĉev kaj Stefan Uzunov.

La prezidanto s-ro Petrov fermis la kongreson per konvenaj paroloj.

La kongreso finis. Samideanoj, ni streĉu niajn fortojn! Al laboro!

AL LA 14-A HUNGARLANDA ESPERANTO-KONGRESO

La Budapesta stacidomo „Keleti“ svarmas de pasaĝeroj. Mi facile trovas mian vagonon, ĉar sur ĝi estis metata verda flago. Ĉiuj kongresanoj estas bonhumoraj; sur ĉiuj vizaĝoj estas rimarkebla ĝojo kaj feliĉo.

Baldaŭ la vagonaro forlasis la urbon. Jam ni flugas tra la grandega hungara ebenaĵo. Agrabla maja tago. Ni staras ĉe la fenestroj kaj rigardas la belegajn pejzaĝojn.

Babilante kun miaj junaj geamikoj, mi eĉ ne rimarkas kiel trapasas la horoj. Jen la vagonaro haltas. Ni jam atingas nian celon — Kaloĉa. La stacidomo svarmas de renkontantoj. Sekvas tradiciaj paroladoj.

La historia urbeto Kaloĉa havas festan aspekton. Ĉiuj domoj estas ornamitaj kun naciaj standardoj. 200 geesperantistoj kaj multaj scivoluloj plenigas la urban placon. Sub la tonoj de muziko komenciĝas granda fakla manifestacio ĝis la urba domo. La urbestro eliras sur la balkono. Ĉiuj silentas kaj aŭskultas la sorĉan muzikon. Subite ĉiuj ekkrias, salutas la urbestron. En la katolika domo ni ricevas vespermanĝon. Fine okazas konatiĝvespero. La tuta programo estas bone aranĝita.—Ciganmuziko, deklamoj, kantoj k. t. p. amuzas la gastojn.

Dimanĉe, je la 9-a horo okazas sankta meso en la katolika preĝejo. Komprenoble — esperantlingve. Post tio jam komenciĝas la kunsido de la kongreso en la urba domo. La salutparoladoj estas multe. Mi, kiel bulgaro, ankaŭ devas saluti la kongreson per kelkaj vortoj. (Eksterlandanoj estas ankoraŭ: unu finnino kaj du estoninoj). Inter la oratoroj plej longe estis aplaŭditaj prof. Erdelyi kaj s. Julio

Baghy. Post la fino de la laboro okazas tagmanĝo oficiala.

Por surprizo de la gastoj je la sama tago okazas popola edziĝfestoj. Mi vere havis okazon vidi la hungaran popolon, ĝiajn multkolorajn artebroditajn vestaĵojn kaj interesajn dancojn.

La tempo pasas rapidege. Baldaŭ venas la vespero. Kun miaj dommastroj mi vizitas urban teatron. Kongresanoj kaj urbanoj plenigas ĝin. Ĉiuj atendas senpacience la komencon de la programo. Tio ne malfruas. Ĝi estas tiom riĉa, ke daŭras pli ol du horoj. Ĉiuj artistoj bonege plenumas siajn taskojn, sed fortegajn aplaŭdojn ricevas la infana danca grupo kaj la mondkonata Julio Baghy, amato de ĉiuj, kiu estas granda artisto kaj fama poeto.

La dancoj daŭras ĝis la mateno.

Venas la lasta tago. Antaŭ tagmezo ni vizitas la historian pastran bibliotekon. Je la 4-a horo ni jam estas ĉe la stacidomo. Ĉiuj tieaj gesamideanoj venas nin forsendi. Ŝajnas al mi, ke neniu deziras ke ni forlasu ilin.

La vagonaro ekiras. Subite ni aŭdas kriojn: „vivu Kaloĉa! — Vivu esperanto“.

Finas la kongreso; rapidege pasis tri agrablaj tagoj, kiujn mi bone memoros. Pri Bulgarujo mi estis atakita kun demandoj. Al mi faris grandan impreson la fakto, ke la katolikoj hingaraj bonege komprenas, ke esperanto estos *ilo*, kiun ĉiuj devas uzi.

La vagonaro flugas tra senfina hungara ebenaĵo. La kongresanoj babiladas kaj kantas diversajn kantojn. Jam malproksime estas Kaloĉa, sed restas la neforgeblaj memoroj.

Vasil Todorov
(Vil. Gagovo, Popovsko)

Съдействици, отъ васъ зависи да имаме редовенъ органъ. Платете веднага абонамента си, за да се осигурятъ материални срѣдства.

AT. D. ATANASOV

Prezidanto de la Bulgara
Esperantista Asocio

NECESA KLARIGO

La membroj de la Bulgara esperantista asocio rajte ne restis kontentaj de la gvidantoj de la organizaĵo dum la pasinta jaro. Mi, estante sur la kaploko de la estraro, portas mian parton de la respondeco. Kaj tamen nun, kiam spite la malkontenteco, mi estas denove elektita membro de la estraro kaj eĉ denove prezidanto, mi ŝuldas kelkajn klarigajn vortojn al miaj samideanoj, por forigi plue nenecesajn miskomprenojn kaj riproĉojn.

Do, mi deklaras malkaŝe, ke en la lastaj jaroj mi estis elektata ĉiam kontraŭ mia volo kaj konsento. Antaŭ 3 aŭ 4 jaroj junaj kaj inteligentaj samideanoj, ĵus elektitaj en la centra komitato, dezirantaj doni viglan antaŭenpuŝon al la movado, insistis tre energie, ke mi okupu la postenon de prezidanto, promesante, ke ili mem plenumos la tutan laboron de la gvidanta centro, konsentante senrezerve, ke mi eĉ ne partoprenu regule en la kunsidoj de la komitato.

Miaj motivoj por malakcepto estis, ke mi disponas tre malmultan liberan tempon, mi apartenas al generacio de esperantistoj, kiu donis jam al la Esperanto-movado tion, kion ĝi povis, kaj kiu jam estas lacigita.

Mi persone konscias tre bone, kiel devas agi gvidanto de asocio, kion li devas doni por ĝia prospera vivo. Nu bone, mi sincere deklaras, ke mi ne havas jam la necesajn fortojn por plenumi dece tian devon: sekvi seninterrompe la movadon, esti en konstanta ligo kaj korespondado kun la samideanoj en la diversaj lokoj, okupi min pri la lokaj problemoj de la movado, doni konsilojn, skribi artikolojn, veturi ĉi-tien kaj tien por apogi la penojn de la samideanoj per publikaj paroladoj, serĉi ĉiajn okazojn por vidigi publike la movadon kaj la organizaĵon ktp.

Por tia vigla aktiva laboro estas necesaj novaj homoj kun freŝaj fortoj. Mi flatas min per la penso, ke antaŭ jaroj mi havis tiajn kvalitojn de gvidanto kaj ke

tiam mi povis doni dece mian tributon al Esperanto.

Nun, tamen, ne plu. Bedaŭrinda, sed neevitebla efektiveco: la povo de homo ne restas senfina.

Jes, mi atendas la demandon: Se estas tiel, pro kio vi akceptas la elekton?

Antaŭ 3—4 jaroj mi cedis al la insistoj de la tiamaj multpromesantaj membroj de la centra komitato, mi ekkredis iliajn asertojn, ke ili bezonas nur mian formalan partoprenon, ke tio estos morala apogo al la movado, ke mia nura figurado en la komitato kaj sur la prezidposteno akcelos ilin al pli vigla kaj sindona laboro, kaj tiam mi akceptis. Kio okazis plu? — Okazis, ke mi estis eble unu el la plej akurataj partoprenantoj en la kunsidoj, dum la plimulto el ili ĉesis aperadi kaj labori. Mi ne akuzas, ne riproĉas, ne indignas. Ĉiu havas siajn kaŭzojn por neagado, kiujn mi ne povas ĉiam koni. Mi nur konstatas.

De tiam oni regule min reelektas prezidanto — eble pro manko de alia, pli taŭga. Mi atendas tiun alian. Mi estas preta ĉiun momenton retiri min de la okupata gvidposteno, por doni lokon al tiu kiu eklaboros pli bone, pli vigle, pli regule. Sed kie li estas? Kiam li venos?

Serĉu lin, trovu lin, eĉ — se necese — kreu lin!

Ekspozante malkaŝe kaj sincere la problemon, mi ŝuldas aldoni ankoraŭ kelkajn notojn. La bulgaraj samideanoj devos tre bone scii, kio kreis, interalie, malhelpojn por pli vigla agado dum la lastaj jaroj, kaj atente peni eviti tiujn difektojn, se ili deziras, ke la estonta gvidanto efektive povu labori por la plifortigo de la asocio kaj por la prospero de Esperanto.

Unue. Ekzistis ĉiam, ekzistas certe ankoraŭ nun kelkaj esperantistoj en nia lando, kiuj ĉiam ligis kaj ligas sian partoprenon en la Esperanto-movado kun siaj politikaj kredoj kaj konceptoj. Ilia

sentakta laboro, ĉiam celante demonstracii siajn politikajn inklinojn, pritaksi kaj kritiki la agojn de la samideanoj kaj precipe de la gvidantoj nur el tiu vidpunkto, serĉi ĉiam personojn kun samaj konceptoj kaj provi formi grupetojn kun similaj konceptoj en la movado — ĉio ĉi tio kreis en pluraj momentoj grandan embarason al la gvidantoj. Tiaj samideanoj tro naive supozas, ke la aŭtoritatoj, kiuj havas la taskon gardi la ŝtaton kontraŭ la detruaj elementoj, estus blindaj kaj senobserve lasus nian movadon, — eĉ en la tempoj, kiam ĉiuj scias la metodon de la laboro de l'maldekstraj politikaj elementoj en ĉiuj kulturaj organizaĵoj. Pro la persista kaj sentakta konduto de tiaj personoj nia movado longe estis sub suspekto. Granda estis la eventualeco, ke la aŭtoritatoj malpermesu la esperantistajn organizaĵojn. Ni apenaŭ sukcesis sankcii nian statuton! — Ĉu mi menciu ankaŭ, kiomfoje ĝis nun la gvidantoj de la asocio kaj de la Sofia societo estis invitataj en la Direkcion de la polico, por esti demandataj kaj por aŭdi avertojn pri la konduto de iuj esperantistoj? — Se la bulgaraj samideanoj deziras krei verajn kaj sindonajn gvidantojn, ili devas ŝpari al ili tiajn maaĝrablaĵojn. Kiamaniere? — Atentante la diversajn agojn kaj kritikojn de apartaj nesenpartiaj esperantistoj kaj nekreditante ilin. Alie — la riskoj kaj la dan-

ĝeroj tute ne estas evititaj; ni tre facile povas trovi nin iun matenon ĉe dekreto por malpermeso de nia movado.

2 Due. Asocio sen materiala povo, sen monrimedoj, ne estas agokapabla. En la unua momento de nova asocia jaro la gvidanta komitato ĉiam ĝis nun trovis malplenan kason. La enspezoj dum la jaro estas tro anemiaj. Okazas ofte, ke eĉ cirkulero ne povas esti presata kaj dissendata pro manko de mono! Sama estas la situacio de la gazeto „Bulgara esperantisto“. La presigo de ĉiu numero estas malfacila problemo por la gvidanta komitato. — Kaj, ĉe tiaj cirkonstancoj, oni atendas viglan laboron, oni malkontentas pro la neaktiveco de la komitato, oni kritikis... Regule estas, ke ĉiu esperantisto jam en la komenco de la nova asocia jaro pagu honeste kaj senprokraste sian kotizon kaj sian abonpagon, kaj ke tiuj sumoj senprokraste venu en la asocian kason. Se ĉiuj faros tion, nur tiam oni rajtos postuli aktivan laboron de la centro kaj rajtos kritiki, se ĝi malviglos. Do, kiam aperos la dezirata de ni ĉiuj kaj atendata gvidanto, apogu lin kaj donu al li eblecon labori! Alie — vi vidos nur la ĝisnunan staton.

Samideanoj, mi diris mian parolon. Pripensu kaj faru tion, kion vi juĝos necesa.

SCIIGOJ

Al la senditaj de la Bulgara esperantista asocio salutoj okaze la feston de la surtroniĝo de Lia Reĝa Moŝto Boris III, reĝo de la bulgaroj, kaj okaze de la realveno de Suda Dobruĝo en la sinon de la Bulgara patrujo, L. R. Moŝto bonvolis respondi per la jena telegramo:

**Atanasov prezidanto
de la Asocio de bul-
garaj esperantistoj**

Mi dankas sincere al vi kaj al la membroj de la Asocio pro la direk-

На изпратенитѣ отъ Българския есперантски сѣюзъ поздрави по случай празника на възшествието на Негово Величество Борисъ III, царь на българитѣ, и по случай възвръщането на Южна Добруджа въ лоното на Българското отечество, Негово Величество благоволи да отговори съ следната телеграма:

**Атанасовъ, председателъ на
Дружеството на български-
тѣ есперантисти**

Благодаря искрено Вамъ и на членовѣтѣ на Дружеството за из-

titaj al Mi salutoj kaj bondeziroj
okaze la duoblan feston.

La reĝo

La telegramo de la Asocio tekstas:

*Lia Reĝa Moŝto
Sofia*

Je mia nomo kaj je la nomo de la bulgaraj esperantistoj mi prezentas al Via Reĝa Moŝto korajn salutojn kaj bondezirojn okaze Vian surpaŝon sur la bulgaran tronon, kiu festo ĉi-jare feliĉe koincidas kun la grandaj popolaj jubiloj pri la reveno de Dobruĝa al la patrujo-lando. Ke la Ĉioprova helpu vin atingi laŭ la sama racvojo ĉiujn ideojn de la bulgara nacio.

Prezidanto: Atanasov

пратенитѣ поздрави и благопожелания за двойния празникѣ.

Царѣтъ

Телеграмата на Съюза гласи:

*До Негово Величество Царя
София*

Отъ свое име и отъ името на българскиятъ 'есперантисти поднасямъ на Ваше Величество сърдечни поздравии и благопожелания по случай възшедствието Ви на българския престолъ, който празникѣ тази година щастливо съвпада съ голѣмитъ тържества за възвръщането на Добруджа къмъ майката отечество. Дано Всевишниятъ Ви помогне все по сжщия миренъ пѣтъ да постигнете всички идеали на българския народѣ.

Председателъ: Атанасовѣ

• За югославянското есперантско списание „La suda stelo“ се приематъ още нови 50 абонати. Годишниятъ абонаментъ е 30 лева. На записалитѣ се нови абонати ще се изпратятъ всички излѣзли до сега бройове на списанието. Сумата се внася на името на Съюза чрезъ пощ. чек. смѣтка № 1133.

• Избраниятъ отъ 27-я конгресъ въ Ловечъ управителенъ съветъ се конституира както следва: председателъ — Атанасъ Д. Атанасовѣ, подпредседателъ — д-ръ Стоянъ Ст. Джуджевѣ, секретаръ-касиеръ — Бѣлчо Тод. Октомврийски, редакторъ — Иванъ Сарафовѣ и съветници — Стефанъ Ганчевѣ, Иванъ Котовѣ и Богдана Попова.

• На 25. септемврий редакторѣтъ на „Bulgara esperantisto“ и членъ на управителния съветъ на Съюза г. Иванъ Сарафовѣ поради много заетостъ си подаде оставката. На негово мѣсто въ упр. съветъ като подгласникъ влѣзе г. д-ръ Захари Захариевѣ.

• 27-ятъ конгресъ въ Ловечъ гласува следния бюджетъ за съюзната 1940 — 1941 година:

Приходѣ:

1. Отъ членски вносъ	10,000	лева
2. „ абонаментъ	38,000	„
3. „ продажба стоки	—	„
4. „ разни	1,000	„
5. „ помощи	2,000	„
Всичко	51,000	лева

Разходѣ:

1. За сп. „Bulgara esperantisto“	20,000	лв.
2. „ експедиция на списан.	5,000	„
3. „ пощенски разноски	2,000	„
4. „ канцеларски	3,500	„
5. „ възнагр. на секр.-кас.	12,000	„
6. „ дългове	6,547	„
7. „ разни	953	„
8. Наличностъ отъ мин. год.	1,000	„
Всичко	51,000	лв.

• По поводъ запитванията, кога ще има сесия за произвеждане на изпити за лектори по есперанто, съобщаваме, че редовната ще се състои презъ м. юний. Извънредна сесия сега презъ есента нѣма да има. За да се състои редовната сесия, обаче, ще трѣбва да се явятъ кандидати. Въ следния брой ще съобщимъ нѣкои подробности относно

правилника по прилагане на закона, а така сжщо и изпитната програма.

● Съидейникътъ Иванъ Шиваровъ е подарилъ сумата 100 лв. за сп. „Bulgara esperantisto“ по случай раждането на дъщеря.

Съидейникътъ Иванъ Есперовъ е подарилъ сумата 50 лв. за сп. „Bulgara esperantisto“ по случай раждането на първия си синъ.

Редакцията изказва благодарностъ на двамата съидейници и ги поздравлява по счучай щастливото събитие въ тѣхния животъ.

● **Есперантското дружество „Solidareco“** — Русе разполага съ известно количество отъ албума на българскитѣ есперантисти, издаденъ презъ 1929 год. Умоляватъ се съидейницитѣ, ликоветѣ на които сж помѣстени въ този албумъ, а сжщо и дружествата да си купятъ такъвъ. Цената е 10 лв., включително и пощенскитѣ разноски. Поржчкитѣ да се правятъ до сжщото дружество. Албумътъ може да послужи като добъръ и евтинъ подаръкъ за съидейници въ страната и чужбина, съ които се кореспондира. Съ това ще се направи голѣма услуга и полза за есперантизма и за есперанто въ страната ни.

● En la redakcio estas ricevita tre interesa broŝuro „Literatura observo en Estonio, Latvio, Litovio, 1939 j“. Mendebila de Esperanto-asocio de Estonio, Tallinn, postkast 6. Prezo: 2 respondkuponoj.

● **Пъленъ Есперанто-българ. речникъ** (енциклопедиченъ) отъ Атанасъ Николовъ, издание на книгоизд. „Братство“ — Севлиево. Цена 80 лв. Речникътъ съдържа 500 страници, форматъ $17\frac{1}{2} \times 12\frac{1}{2}$. Съ тоя речникъ българската есперантска литература се обогатява много; той е отлично помагало за всѣки. Той е едно цѣло богатство въ ржцетѣ на есперантиститѣ.

Речникътъ е одобренъ отъ Българ. есп. сѣюзъ съ протоколъ № 4 отъ 28. II. 1940 год. Речникътъ е пъленъ, въ него сж вмѣкнати много нововъведени въ есперанто думи. Съ неговата поява се запълва една голѣма празнота. До сега българскитѣ есперантисти срѣщаха голѣма трудностъ поради обстоятелството, че не разполагаха съ пъленъ речникъ. Речникътъ на Хар. Бъчваровъ е вече библиографична рѣдкостъ. Речникътъ на Атанасъ Николовъ е сжщинска енциклопедия. Оня, който борава съ него, нѣма да има нужда при търсене на нѣкои думи и понятия да рови речници на чужди думи, за да си изясни тѣзи думи и понятия.

NEKROLOGOJ

† **Profesoro Stefan S. Bobčev**, naskita la 20. I. 1853 en Elena, mortinta la 8. IX. 1940 en Sofia. Granda scienculo, fama slavisto kaj bona amiko de esperanto. Kiel ministro de la publika instuado en 1912 li oficiale delegis s-ron Krestanov en Krakovo por esprimi al d-ro Zamenhof lian admiron pro lia genia kultura verko.

Pacon al lia cindro kaj eternan memoron!

Kun profunda emocio ni informas, ke mortis en Bern (Svislando) post nelonga malsano

s-ro **Eduard Stettler**,

honora prezidanto de UEA.

Nedisigeble ligita estas lia nomo al Universala esperanto-asocio, al kiu li apartenis de la komenco. Al UEA li donis la seriozan fundamenton por la agado.

De La redakcio

Ni sciigas la samideanojn pri la morto de nia amata kaj modesta amiko, membro de la Sofia esperanto-societo

Vasil Iv Iliev

ĉefo de la poŝtĉekservo.

Li estis redaktoro de la esperanto-paĝo en la poŝtovicista gazeto.

La 25-an de oktobro mortis en Sofia

Ivan Ĥr. Najdenov

eks-oficiro (majoro)

naskita en vil. Ŝipka.

Malnova kaj sindona esperantisto.

Ĵeko Kir. Obuŝtarov — horloĝisto st. „Klementina“ № 7 urbo Elhovo (Bulgarujo) deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Same interŝanĝas poŝtmarkojn.

Изплати абонамента си, или върни броя!

Отъ съществено значение за всѣкой есперантистъ е да знае, какви речници и учебници за изучаването на есперанто съществуватъ, какви пропагандни книги сж излѣзли, както и какви книги на есперанто сж печатани въ България, за да знае, какво да чете и какво да изпраща въ странство. Всичко това може да се види отъ книгата:

**БИБЛИОГРАФИЯ НА БЪЛГАРСКАТА
ЕСПЕРАНТСКА ЛИТЕРАТУРА**

отъ Емилъ Стратевъ,

която наскоро ще излѣзе отъ печатъ. Тя ще съдържа и подробни сведения за всички годишнини на списанието „Bulgara Esperantisto“. Който се запише до 15. декемврий, ще има книгата на абонаментна цена 5 лева (изпратени въ марки на адреса на автора — Е. Стратевъ, Алабинска 50, София). Следъ излизането си книгата ще струва двойно.

RAPIDU — БЪРЗАЙТЕ! Пишете веднага до Ив. Хр. Кръстановъ, ул. 6. Септемврий 2, София да ви прати следнитѣ ценни книги:

„БЪЛГАРСКАТА АНТОЛОГИЯ“ — отлична читанка на есперанто, 250 стр., съ портрети, най-добриятъ помощникъ при усъвършенстването ви въ международния езикъ и най-хубавиятъ даръ за чуждестраннитѣ ви есп. кореспонденти. Отстѣпя се на половина цена, т. е. само за 50 лв. включително пощ. разноски.

КНИЖАРНИЦА „БРАТСТВО“ СЕВЛИЕВО

пощ. чек. с-ка 2201

Доставя:

Пълень Есперанто-български речникъ. отъ Ат. Николовъ, необходимостъ за всѣки български есперантистъ. Цена 80 лв.; подвързанъ 100 лв.

Учебникъ по есперанто отъ Д-ръ Захариевъ съ 316 картини въ текста. Лесна и практична метода за изучаване на Есперанто съ системно подредена граматика. Цена 20 лв.

Практична граматика на есперанто отъ Емилъ Стратевъ, необходимо помагало за всѣки есперантистъ. Цена 6 лв.

Картички за кореспонденция съ лика на д-ръ Л. Л. Заменхофъ и химна на есперанто 10 броя 4 лв.

Картички за кореспонденция (два вида) трицвѣтенъ и двуцвѣтенъ печатъ, 10 броя 15 лева.

Залепки за кореспонденция (glumarkoj) 5 вида 100 броя.

Портрета на Заменхофъ, голѣмъ форматъ (33 × 27 см.) художествена изработка. Цена 5 лева.

Есперантски значки—зелена звезда на бѣло поле. Цена 10 лева.

Зелена звезда съ изрѣзани краища. Цена 8 лева.

Есперантски синтаксисъ отъ д-ръ Зах. Захариевъ, намалена цена 10 лв.

„БЪЛГАРСКАТА СТРАНА И НАРОДЪ“ на есп., съ трицвѣтна етнографическа карта, има само още стотина екземпляра, които се отстѣпватъ по 75 лв.

„ДВОЕНЪ ЕСПЕРАНТО-БЪЛГ. И БЪЛГАРО-ЕСП. РЕЧНИКЪ“ — най-пълниятъ до сега (III-о издание, 312 стр.) съ основна граматика се отстѣпя на абонатитѣ ни за 55 лв.

А всичкитѣ три горни книги само за 175 лв. включително пощ. разноски и препорѣжка.

„СПИКТУР“ ИНСТИТУТЪ

20, ул. Царь Калоянъ — София
доставя следнитѣ учебници, граматика и реч-
ници за изучаването на есперанто:

- ** Кратъкъ курсъ по есперанто.**
Преведе Иванъ Сарафовъ 12 лв.
Атанасъ Д. Атанасовъ. **Курсъ по есперанто за българи.** Осмо издание 20 лв.
Д-ръ Зах. Захариевъ. **Учебникъ по есперанто по директната (говорна) метода съ 316 картини въ текста** 20 лв.
Дим. Ивановъ. **Есперанто картиненъ учебникъ за самоуци и курсове за начеващи и напреднали.** Второ подобро издание 20 лв.
Th. Carl. **Есперанто пъленъ курсъ, нагоденъ и за самообучение.** Метода лека и бърза. Превелъ и нагодилъ за българи Георги Атанасовъ 20 лв.
Емилъ Стратевъ. **Практична граматика на есперанто** 6 лв.
Захари Захариевъ. **Есперантски синтаксисъ (за българи)** Намалена цена 10 лв.
**** Ключъ есперанто** 5 лв.

- Асенъ Григоровъ. **Българо-есперантски речникъ,** 25 лв.
Асенъ Григоровъ. **Есперанто-български речникъ** 15 лв.
Атанасъ Николовъ. **Пъленъ есперанто-български речникъ** 80 лв.
Ив. Х. Кръстановъ. **Есперанто-български и българо-есперантски речникъ (съ основна граматика)** (неподвързанъ 60 лв. подвързанъ 75 лв.)
Суми се превеждатъ чрезъ пощ. чек. смѣтка № 3616 или чрезъ пощенски или гербови марки.

Наскоро излиза отъ печатъ
стененъ календаръ
ЕСПЕРАНТО цена 5 лева
джобно календарче
ЕСПЕРАНТО цена 1 левъ
За поржчки надъ 10 екз. 20% отстъпка
Всѣки есперантистъ трѣбва да си набави календара **ЕСПЕРАНТО.**
Поржчки при: „СПИКТУР“ институтъ—
20, ул. Царь Калоянъ — София

DEZIRAS KORESPONDI

- S-ro Kováts Lajos, tanító—Kiskörös, Hungario (instruisto).
- S-ro Csizmadia Géza, Petöfi-útca 62. Kiskörös, Hungario. (junulo).
- F-ino Ida Gábor, Horthy Miklós út 72 Ujpest, Hungario
- S-ro Carl Seger, Förmansgatan 3. A. Motala, Verkstad, Svedujo.
- Fraŭlino Ingeborg^a Nielsen, adreso: Fru Weitemann, Skrams Gade, 3 Mezz, Kopenhago.
- Supl. Sygeplejerske Metha Petersen, St. Hans Hospital, Roskilde Danujo.
- Fraŭlo Enok Henriksen, Vesterdamgaard, Thyregod, Danujo.
- Sinjoro kaj sinjorino Krusborg, Vesterdamgaard, Thyregod, Danujo.
- S-ro Söner Cristensen, Thyregod Trelast, Thyregod, Danujo.
- S-ro Tolstrup Cristensen. Kokborg, Thyregod, Danujo.
- S-ro Magnus Jespersen, Thyregod, Danujo.
- S-ro Lontrolast. Emil Hansen, Thyregod, Danujo.
- Fraŭlino Kristiane Teglgard, Thyregod Danujo.
- Knabo Erik Andersen, Skolen, Thyregod Danujo.
- Knabo Otto Terndrup, Thyregod, Danujo.
- Fraŭlino Emma Laursen, Thyregod, Danujo.
- Fraŭlo Soren Sorensen, Thyregod, Danujo.
- S-ro S. Saričev, Baĥmetievskaja 27, kv. 1. Saratov. U. S. S. R.

ИЗУЧЕТЕ ЕСПЕРАНТО ПО УЧЕБНИКА

КУРСЪ ПО ЕСПЕРАНТО ЗА БЪЛГАРИ

отъ Ат. Д. Атанасовъ

VIII издание. До сега разпространенъ въ 39 хиляди екземпляра. — Цена 20 лева

Поржчки: Ат. Д. Атанасовъ, София, Гладстонъ 48. Пощенска чекова смѣтка 4343

„BULGARA ESPERANTISTO“ —
monata organo de la Bulg. Esp. Asocio.
Adreso: 50, str. Alabin, Sofia, Bugarujo.
Poŝtĉekkonto: 1133

JARABONO: *Enlande — 20 bugl. levoj. Eksterande—4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.*
Anoncoj: 1 kv. cm. — 1 levon
RESP. REDAKTORO P. JORDANOV

ПЕЧАТНИЦА „ХУДОЖНИКЪ“ —СОФИЯ — ESPERANTO-PRESEJO „ХУДОЖНИКЪ“ — SOFIA-2